É 100% Regular
Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.
Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO, DEC.2010.
Str.Esperanto, 880 – Kiurbo-RS
Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Donace por ĉeestanto dum la Verda-Kafo
Krom foraj loĝantoj, perpoŝte, R$ 1,00

.....

ELSPEZAJ KOSTOJ

Ĉi periodaĵo ne celas lukron. Unu realo postulata estu por kompenci la kutimajn elspezojojn.(Materialo kaj poŝtafranko).

Oni ja preferas ke la gesamideanoj venu ĉiun monaton. Kelkaj, por montri kiel ili ankoraŭ aspektas, post eta eterneco da forrestado. Oni ne strangolu aktivajn samideanojn elstare bonajn geamikojn, per resopiro ! Tre plaĉus al ni ekscii kio okazis al Kleonice, al Miriam kaj al Lukas, Niceja, Nilse... k.a., ĉu la Verda Kafo malbonfartigas ? Do trinku hordean sukon sed venu atesti ke vi vivas kaj ne Kabeis.

RAREGA ESCEPTO

Dum la novembra VK-kunsido oni unuanime decidis, pro la koincido de lasta sabato kun Kristnasko-tago, anticipi la Verdan Kafon al la tria sabato, 18/12/10, por samtage festi la memortagon pri nia onklo Zamenhof. Estis serioza tasko por chiuj samideanoj : klopodo atingi la adresojn de chiuj esperantistoj brazilaj antaŭ tiu dato, por ke neniu rompo sian nazon sur la enirejo en Tuty's, la kutima kunsidejo sed iru rekte al GEA, str.Andradas, 1251/10º, Porto legre-RS. Ĉiu BV pluaverti la ŝanĝon al siaj geamikoj, substrekante ke solidareco fortikigas nian pacan movadon. Amen. Ni provu fini la unuopulajn «E-societojn» ĉie ajn. Estas pruvite ke la teorio, babili kun la spegulo tedas la bonintencajn provintojn Ili baldaŭ forgesas sian taskon, kaj neniam fariĝas almenaŭ lertaj balbutantoj. Kiu iam provis, tiu konfirmas la fakton. Lertiĝu en grupo ! Scii lerte, konversacii estas la plej bela vizitkarto, de gesamideanoj. Nediligentaj homoj fariĝas, laŭ brazila malapreca difino: valizo sen anso. Ili elĉerpas la paciencon eĉ de la historia Ĵó...

ALMOZULO

Kiu ankoraŭ ne vidis tiun INTERNET mesaĝon « La Almozulo »nepre devas spekti tiun filmeton. Ĝi rakontas emociigan estorion pri bonkora oldulo, almozulo nomata Serapiao kun sia delongaj jaroj fidela amiko, lia mezgranda hundo Maljado. La bildo estas ĉiam la sama: la almozulo sidas ie ĉe trotuaro kaj komforte tenas la hundon en la sino.Nur ĉi tenera bildo valoras pli ol mil vortoj.La akompanaj tekstoj resumas conversacion inter Serapiao kaj hazarda preterpasanto. La aŭtoro lerte scias melki larmojn de la leganto. Eĉ mi, oldulo tanita de multspecaj malicaĵoj de la vivo, devas konfesi al vi, karaj gelegantoj, ke ne eblis kaŝi larmojn. Do dankojn al kiuj sendis la rakonton al mi kaj ne laste al la aŭtoro de la pluraj teksteroj.

FLAGO

Malgraŭ la aĝo de nia V-Kafo, ĝis nun neniu rondano kuraĝis aĉeti malgrandan E-flagon por ĝin etendi antaŭ ol oni registras la kunvenon per foto. Nur vortoj kiuj asertas ke la foto montras E-kunsidon ne sufiĉe konvinkas se ĝi estas iam publikigota. Mi esperas ke ĉiuj pensas same kaj favoros akiron de standardo facile portebla. Laŭ mia opinio sufiĉas malgranda (100 x 50 cm ?). Ĉefurbanoj, kandidatiĝu trovi farejon kaj volontulon kiu antaŭpagos..

REVO

Ĉiu verda aktivulo revas arigi homojn almenaŭ interesatajn atente aŭskulti unu horan eksplikoj pri la mirinda strukturo de nia kara lingvo. Per ĵurnala invito mi jam provis tiucele allogi interesatojnproponinte kelkajn botelojn da biero, ĉe mia domo dum sabata aŭ dimanĉa posttagmezo. Montriĝis neniu ! Nu, mi konsentas ke la allogaĵo ja estas tro mizera por profesiaj botelo-sekigistoj. Por altiri kaianojn oni eble devas pretigi krom bierumadon ankaŭ gajan festenon kun dancado kaj ĉurasko.La invitilo prefere estu sur ora karto. Jen mia impreso pri la nuntempaj junuloj de mia regiono kie cetere 65% ne vizitis la kvaran lernojaron. Aldone estas la fakto ke la homoj hejme kaj surstrate parolas senhonte, ne la germanan sed jes la fifaman Hunsrück. La plejparto, kulture blinda, riproĉas al tiu kiu alparolas ilin germane. Ili diras:”sed mia kara, vi parolas aĉaĵon ne la germanan”! La marĝena germanlingvo (hunsrück) tiome enradikiĝas en ilian cerebron ke kelkaj aŭtoritatuloj (urbestroj), kiam dvas diskursi sed ne havas anstataŭanton, parolas kun aĉa akcento kaj pononco-devojiĝo, ekz. “aRReja” “Kafanjoto”, ktp. ne hontas sed kompromitas kaj elmetas la tutan regionon al primokado. Certagrade mi rakontas ĉisupran por montri kial en mia regiono malfacilas, pli ol aliloke, la enkonduko de Esperanto.

REVO II

Revo bonfartigas, despli se sama revo okazas inter multaj rondanoj samtempe. Aldoniĝas la vaste kredata fakto ke, sinjorino Fortuna lasas sin tuŝi kiam amaso da bonintencaj pensoj atingas ŝin. Oni kredas ke tio klinigos ŝin priatenti kaj plenumi justajn petojn. Ĉu nia neŭtra idealo estas ne justa? Tial do ni revu ke ĉiu ajn esperantisto, agordu sian penson kun la mistera estulo, sinjorino Fortuna, por tikli ŝian emon favori speciale la brazilan E-movadon per granda antaŭena puŝo. Tiucele bonvenus la baldaŭ venonta nomata VIRADA DA MEGASENA. Mi jam akiris la mian vetilon. Ĉiu el ni provu kapti la “fiŝegon” kun la firma promeso investi la duonon de la premio en la trezoron de Esperantujo, BONA ESPERO ! En unu « vapt vupt » la brazila E-movado sorus al la nivelo de nialanda nuna prosperiĝo. Tuj, ek al!

MANKOJ

El la buŝo de E-kontraŭuloj kelkfoje aŭdeblas, ne tute senpravaj plendoj, nome: ke al Esperanto mankas flekseble co kiam necese traduki dusignifan vorton aŭ dirmanieron. Ekzemple, la nuntempan modismon iam uzitan de prezidento Obama, por kvalifiki la brazilan prezidenton dum la vizito al USONO: “Você é o cara”. En tia cirkonstanco oni subkomprenas ion bonan, favoran. - Estis eldonita libro, far Carlos Alberto Carvalho, titolita VOCÊ É O CARA.(Mi ankoraŭ ne legis ĝin). En Esperanto la tradukanto ja sukcesas havigi al leganto, per kelkaj vortoj, nur supraĵan, iom malaprecan ideon pri la ĝusta signifo. Por la estanta kazo eble taŭgus diri laŭ iom malplivaloriga, traduko,“cara de paŭ” (Jen, denove tasko, traduki). Tiu manko malaperus se oni kuraĝe enkondukus taŭgajn, oportunajn vortojn/kurtan frazon, eĉ inventitajn. Ekz: RAÇÃO. Bv provu traduki la vorton al ĝia ĝusta signifo por kio ĝi ekzistas, t.e. manĝaĵo akurate mezurita/pesita por difinita speco de animaloj, ĉu por idoj (kreskiga), ĉu por grasigi, ĉu kun la celo ovojn metigi, ĉu por bonrasaj bestoj. Por mencii “ração” por hundoj aŭ por katoj, mi kutimas diri katmanĝo. Homo pli saĝa ol mi inventu kurtan kaj idealan vorton kiu sintetizas la diferencajn manĝaĵojn.

NOTO - Tial ke neniu leganto riproĉis min pro la fakto ke mi pretigas aldonaĵon, kaj alkroĉas ĝin al Gisto, mi prenis la liberon tajpi plian tekston far la kolumnisto David

Koimbra. Plaĉas al mi lia sobra, freŝa, iom surpriziga stilo faskigi siajn estoriojn. Tio ekis de kiam mi legis lian rakonton pri terura malvarmo suferinta vintre ie en USONO, kie li komencas rakonti ke li ekvidis Fuska-aŭton, pli ĝuste diri, amason da neĝo parkigitan apud hotela enirejo. Jen do plia finjara legaĵo sed, ne alkutimiĝu al aldonaj tekstoj. Ĉi oldulo eble ne longe eltenos fabriki nian bultenon Gisto sed ĝis nun neniu rondano prezentiĝis libervole transpreni la taskon. Eble mi trompiĝas. Eble la tradiciaj kompanoj nur minimume aprecas miajn vervomankajn kunmetaĵojn.Do...SRY!

Kial Tridekjarulo Restadas en la Gepatra Hejmo.
Far David Koimbra.(el ZH)

Sekso !

En ĉi semajno mi partoprenis en debato kaj meze de verboj kaj adverboj, bela brunulino klarhaŭta kaj nigra hararo hirtigis la montrofingron,montris signifan surfruntan faldon kaj etendiĝis en longa parolado pri familiaferoj, pri kiel la familio premas la junulon, pri kiom junulo devas lukti por la rajto fari ion kion li volas, ne tion kion la familio atendas de li.

Mi sorĉiĝis. De longa tempo mi ne trovis homon ribeleman kontraŭ la familio. Ĉi-tage en l'tria jarmilo la sinteno plej komuna estas trovi homojn maldegnajn ĉar ili NE HAVAS familion...

La brunulino ŝajnis elirinta el drinkejo de la jaroj 70 aŭ 80, malmulte iluminitaj el iu subtegmenta ejo, ie inkrustita ĉe la strato BomFim, eble eĉ en la kaduka Mazza, fronte al PUC*. En tiu tempo la edziĝo estis morta kaj la familio ripozadis en fina stato. Hodiaŭe la homoj gefianciĝas. Fianciĝas ! Uzas edziĝan ringon kaj ĉion ceteran. Junulinoj 20-jaraj uzas « kompromisan ringon ».

La historio moviĝas en cirkloj. Estas la dialektiko de Hegel, estas la periodaj avancoj kaj retroiroj de la socio. La socialaj sciencistoj kredas ke ĉi-modifoj baziĝas sur ekomiaj kaŭzoj. Ekzemple, la tridekjaraj filoj aŭ eĉ kvardekjaruloj kiuj daŭras loĝantaj kun siaj gepatroj. Laŭ la sciencistoj ĉi tiuj barbuloj ne forlasas la hejmon tial, ke multe pli kostas vivi solaj. Stulteco. La La gefiloj daŭras loĝantaj en la gepatra hejmo pro la sekso.

Pratempe la filo aŭ filino ne povis seksumi en la gepatra hejmo. Ili devis « liberigi sin » por rajti eldomiĝi laŭ iliaj voloj, trinki bieron kun « Trigo Velho »,drinkaĉi ĝis la lasta turno de la frumateno, fini la nokton ensorbante supon ĉe van-Gogh kaj, super ĉio partopreni de lito kun kunul(in)o.

Hodiaŭ ĉio permesatas sub la gepatra tegmento. Do, kial havigi al si novan adreson?

Tiel funkciis la ribelo kontraŭ la familio. Oni ribelis ĉar EKZISTIS familio kaj la familio agadis : postuladis, kontrolis, cenzuris, ĝi imponis kondutnormojn. Bridis. Tial ke ne plu estas kontrolo, ne plu okazas ribelado. Kio okazas estas precize la kontraŭo. Ekzistas avido je kontrolo. "Limoj!", ĉiuj laŭte krias. Infanoj bezonas limojn. Kaj tial ke familiaj rilatoj okazas en malpli grandaj medioj, ili spegulas la sociajn rilatojn, ekzistas avido je limoj same endomaj kiel ekster ĝi, enurbe kaj en la kamparo. Ne longe antaŭe, dum la tempo dum kiu la edzeco estis entombigita, la Polico estis malestimata. La uniformizitaj policanoj estis alnomataj "PorkaPiedo", la soldato "Gubernia Avokado". La socio timis la tiel nomatajn "moderigaj organizaĵoj". Nuntempe la socio ilin vokas. Ilin aplaŭdas. Ili estas la novaj brazilaj herooj. Antaŭe oni skribaĉis "for la moderigo!". Nun oni petegas ĝin. La mondo ŝanĝas ĉiam. Kaj ĉiam restas la sama.

*PUC=Pontifícia Universidade Católica.

DUMVIVA MEMBRECO

Iam mi forte batalis, persone kaj pere de perioda bulteno tiutempa, por enkonduki en Esperantujon sistemon per kiu oni povus plimultigi la nombron de UEA-membroj. Osmo Buller, de mi priadresita opiniis la ideon bona, ke mi prezentu ĝin dum la tiam venonta E-Kongreso. Tio estis ekster mia poŝkapablo. Poste mia entuziasmo velkiĝis. Nuntempe mi kelkfoje memoras pri tiucela programo kaj bedaŭras ke nia DM-membraro ŝrumpas, sen espero iam transpasi la milon. Pro la silento de adresitoj mi ne tre kuraĝis repreni la temon sed kun nia, aktuala ŝajne tre vigla prezidanto Dasgupto ŝajnas al mi ke valorus provi aŭ almenaŭ evalui la nunan UEA-estraron pri la afero? Kiu(j) el la diligenta leganttaro interesiĝas pri tiucela strukturo elpensita de mi povos iel helpi? BV disponi pri kopiaĵo de la propono ĉe mi.

ALDONAĴO

Por legado dum la Kristnaska kaj Finjar Festo mi decidis aldoni novan, amuzan estorion far D.Koimbra. Mi konsideras oportune kapti la atenton de vi, karaj gelegantoj, kaj peti ke ĉiu sendu al mi etan kritikon ĉefe rilate al lingvouzado en la rakontoj. Mi pravigas min. Kekloke baris min malfacilaĵo, nome, en vortaro neekzistantaj vortoj. Mi devis elturniĝi laŭ eblis. Kuraĝe kritiku libervole kaj sendu al mia e-poŝtejo.

ARABAJ ESTORIOJ

Far David Koimbra (ZH)

En sia sporta turneo klubo INTER havos la persan golfon antaŭ sia nazo kaj la dezerton Rub-Al-Khali malantaŭe. Dezerto kun fabeloj kaj danĝeroj. Rub-Al-Khali signifas loko malplena kaj, vere tia ĝi estas. Ĝi estas la plej granda sabla dezerto de la mondo kun temperaturoj kiuj atingas de nulo ĝis sesdek gradoj en sama tago, havas dunojn pli altajn ol konstruaĵoj 120 etaĝaj. (“Arab” signifas árido”) – Mi rakontos kelkajn estoriojn de la olda Arabio. La unua pri la plej fama kalifo, Harun-al-Rashid, kiu vivadis kruelan intensecon inter la jarcentoj 8 kaj 9.

Harun rolas en la dua plej fama, arabe verkita libro, “La Mil Unu Noktoj”.La unua, vi scias, estas la Korano. Harun arigis sep edzinojn sed nur unu naskis filon. Aliflanke liaj pluraj kromedzinoj generis dek knabojn kaj dek kvar knabinojn. Tio certe kaŭzis al li grandan elspezon por sekigita lakto. Krom siajn belajn edzinojn la kalifo amis grandkvante drinkadi kaj poeziojn kies aŭtorojn li rekompencis kiel reĝo, reĝamaniere. La poeto Mervan plektis al li odon. Rekompence Harun surŝutis lin per kvin mil oraj moneroj, sublimaj vestaĵo, purrasa ĉevalo plus 10 lindegajn grekajn servistinojn, pretaj obei lin en liaj plej kapricaj deziroj... kiom feliĉa estis tiu poeto Mervan.

La sukceso de la gubernio Harun okazis ĉefe pro lia ĉefministro Jahija Barmak. Kiam li alprenis la regpotencon je nur 22 jaraĝa, la kalifo faris memkritikon, io tre rara far junuloj, li konsentis ke li ankoraŭ ne havis sufiĉan sperton por administri la regnon. Li decidis delegi farendaĵojn, vokis Jahija, metis en lian manon la ringon kun la sigelo kaj anoncis kvazaŭ li estus Lula alparolanta Jozefo Dirseu antaŭ ol prezidentiĝi en la jaro 2002: mi komisias vin la gubernion de miaj subuloj. Regu laŭ vi volas, eksigu kiun ajn vivolas, nomumo kiun vi volas, estru ĉiujn aferojn laŭ via bontrovo..

Zé Dirseu ne seniluziigis, lia regado estis progresema kaj kompetenta. La lando riĉiĝis same kiel la administranto kaj la kalifo. Ĉio marŝadis bone. – Du filoj de Jahja partoprenis de la administrado kaj de la disdivido de lukroj. Harun amadis speciale unu el ili

nomata Jafar, je tiu grado ke li comisiis la kudristinojn de la palaco iun specialan vestaĵon kun du kolumoj. Ambaŭ a du surmetis tiun vestaĵon kaj iradis tra Bagda´ kiel siamaj fratoj. Amikeco tiel intima, eĉ fizike, estigis fikomentojn en la urbo.

Felislangoj ĉiam ekzistis kaj ekzistos en iu ajn epoko kaj regiono. Post al alveno de pli aĝaj tagoj la kalifo eble pentis la tro grandan tranĉaĵon da potenco transdoninta al la ministro. Ĉio indikas ke la funkciuloj fariĝis « tro kuraĝaj », laŭ populara difino. Mastro estas mastro, dungito estas dungitulo. Jafar, la viro de la ornama vestaĵo, forgesis tion kaj konkeris la koron de Abbasa, fratino de Harun. La problemo estas ke Jafar, krom la fakto esti dungito estis perso kaj Harun estis ĵurinta teni la araban sangon pura en la familio. – Kaj nun? – La kalifo solvis la problemon per iom kurioza maniero:Jabar kaj Abbasa povus geedziĝi sed devis ne sin tuŝi. Ili nur havus permeson renkontiĝi en la ĉeesto de li, Harun. Kiel jam eksplikis la Eta Princo: kelkaj ordonoj ne plenumiĝas simple ĉar ili estas ne plenumeblaj. Memkompreneble la pasia geo renkontiĝis, amoris kaj generis. Dum jaroj ili renkontiĝadis kaŝe. Tenis siajn filojn for de la kalifo. Sed iun tagon unu el la reĝaj edzinoj malkovris la farson kaj denuncis la paron Jafar kaj Abbasa. Harun furioziĝis. Ordonis mortigi la fratinon kaj enterigi ŝin sub la palaca planko. Jafar estis senkapigita. Tio fakto estis malbona por lia sano. Jahja kaj la postvivanta frato estis enkarcerigitaj kaj neniam liberigitaj. Fine, la kalifo ordonis ke la gefiloj de la geedzoj estu kondukitaj antaŭ li. Harun admiris iliajn belajn trajtojn, konversaciis kun ili kaj post suspiro ordonis ke la ezekutisto faru sian laboron. Ĉio finis malbone. La rubaj arabaj furtbalistoj lernu de la historio: malobeo sur la duoninsulo povas fariĝi tro ,multekosta.

Iel humure: ‘- Manke de pli bonaj anekdotoj ensenditaj de gelegantoj(escepto, Ennio)jen ĉi magraj, el LOdeE:

MALĜENTILECO

- Mia edzo hodiaŭ kvardekjarigxas. Nia aĝo diferencas ĝuste dek jarojn.
- Ĉu vere? Mi tute ne supozis, sinjorino, ke vi havas jam kvindek jarojn.

IOM “VENENA”

- Nu, ĉu vi vere edziniĝis al via obstina adoranto?
- Jes. Ĝis nun li pendadis ĉiam de mia kolo, sed nun almenaŭ en la vesperoj mi estas libera.

LA ĜUSTA LABORILO

Edzino (al la edzo): Sed Johano, estu ne malsaĝa, vi ne povas enbati najlon en la muron per vestbroso ! Vi devas uzi vian kapon, kara!

TROFEOJ

Knabo: mi posedas belajn memoraĵojn de la lasta sportsezono.

Knabino:Kiajn?

Knabo: kvar pokalojn kaj du medalojn.

Knabino: tre bele! Ankaŭ mi havas kelkajn memoraĵojn.

Knabo: kiajn?

Knabino:kvin fianĉinajn ringojn.

MATINEO

- Sabaton ni bone amuziĝos – diras fraŭlo al sia amatino, mi aĉetis tri enirbiletojn por koncerto.
- Bonege, mi festas de nun, sed kial tri?...du, ĉu ne?
- Tri, karulino, tri, unu por via panjo, unu por via paĉjo, unu por via frato. Mi vizitos vin. Ni pasigos ĉarman vesperon en via dormoĉambro.

MALREKTA KONSILO

Stimuli animalbredadon, grasigon, mistrakton, morton kaj diserigon, por multobligi lukron, estigas tiuj homoj kiuj toleras kadavrojn sur la manĝotablo. Ĉu vi kalkulas sin inter ĉi lastaj, per investoj, por havigi al vi cirkuladajn problemojn?

KONTRIBUIS, EVANDRO CABOKLO (Acróstico)

LÁZARO LUIS ZAMENHOF
ZELOSO E OBSTINADO O
ADMIRÁVEL DOUTOR
MOSTROU PARA A HUMANIDADE
ESMERO NO QUE CRIOU.
NECESSITAVA MOSTRAR PARA A
HARMONIA GERAL
O IDIOMA DO FUTURO DA
FAMÍLIA UNIVERSAL.

É 100% Regular
Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.
Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

FULMO.

Lastminute mian kengon invadis ideo kiu helpos diskonigi Esperanton pere de bonfara ago, jena: Somero alvenis, milaroj da banistoj frekventos plaĝon, damninde centoj da infanoj eble perdiĝos de siaj prizorgantoj, milaroj da parencoj suferos terurajn angorojn (Tio iam okazis al mi!).

SOLVO: igi infanojn kaj handikapulojn uzi plastan braceleton kun la enskribo de nomo kaj adreso (ktp) de ŝi/li laŭ maniero ke ĝi ne malsekiĝu (ekzistas plastaj ujetoj). – Aldone ĝi havu ion memorigan pri Esperanto (GEA-adreson,ktp).Mi riskas taksi ke ĝia prezo ne superas 5 realojn. Kiu ne propagandas tiu stagnas! Ĉiu helpu trovi realigeblon. – Farmanieron: GEA havu stokon da ili. Ĉiu el ni kiu veturos al strando prenu, kunportu kaj proponu la identigilon senkoste, el via mano. Ĉu eblas? Do kuraĝulo investu iom, por poste disdividi la koston inter bonkoruloj. Ĉu bone?